

PIERRE DE CAZENOVE

LA MIGRANTOJ

EN FRANCIO NUNTEMPE

el La franca esperantigis Valo

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
123B * 1978 * 3 FF

BERGEON j-L
esperanto
nun

PIERRE DE CAZENOVE

LA MIGRANTOJ

EN FRANCO NUNTEMPE

el la franca esperantigis Valo

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut


123B * 1978 * 3 FF

Noto de la tradukinto.

En la sekvanta traduko ni nomas Kontrol-Edukado (KE) la vartadon kaj instru-edukadon de junaj (neplenkreskaj) deliktuloj far specialigitaj instruistoj, en fakaj lernejoj sub jura kontrolo.

Tiuj lernejoj anstataŭas la iamajn "domojn de korektaĵo" aŭ "de rerektingado", kiuj estis pli punaj kaj karceraj ol vere edukaj. Ĉi tiuj plej ofte ankrigis la junulojn en iliajn deliktemajn kaj perfortemajn inklinojn, kiuj faris el ili dumvivajn klientojn de tribunaloj. Male, la "kontrol-lernejoj" celas, kaj ofte sukcesas vere reeduki la devojigitajn junulojn, kaj, per tute malsamaj metodoj, fari el ili honestajn laboristojn.

La instruistoj-edukistoj en KE estas ĝenerale idealistaj junuloj, kiuj propravole elektis tiun fakon, kaj deĵoras en ĝi nur kelkajn jarojn; poste ili estas anstataŭataj de pli junaj : tiamaniere konserviĝas la juneco de ilia meza aĝo, kiu tenas ilin pli proksimaj al la menso-stato de la vartatoj, kaj plifaciligas la reciprokajn komprenemon. La aŭtoro de tiu ĉi memuaro estas dudekjara edukisto.



Enkonduko.

Certe studoj pri migrantoj ne estas novaj en la lernejoj de Kontrol-Edukado. Ke ni prezentas tiun ĉi, aldone sendube al sumo da laboroj jam realigitaj en la antaŭaj jaroj, tio estas ne pro celado al originaleco; sed sekve al diversaj konstatoj faritaj dum partoprenado en diversaj formoj de aktiveco en la aparato de KE, ni opiniis utile aldoni unu studon al ĉiuj jam efektivitaj.

Dum la ekkonsciigado en la aparato de KE de l'departamento Rodano, jam aperis al nia grupo de ekkonsciigantoj, ke ekzistas problemoj pri migrantoj en la institucioj vizititaj de ni.

Ĉe la alveno en la lernejo de Savigay*, la problemoj estis diversmaniere elvokita, dum sinsekvaj seminarioj aŭ debatoj en la kadro de la lernejo.

Dum la studtempo en malfermita medio, ni povis alproksimiĝi al la problemoj antaŭe ĉirkaŭita kaj precizigi ĝiajn konturojn kune kun la edukistoj deĵorantaj en Rodano.

Fine, dum la lasta restado en la lernejo, multaj lernantoj partoprenintaj en la kursoj kaj debatoj organizitaj en la kvar lastaj monatoj, metis al si kun pli granda akuteco la demandojn pri solvoj donendaj al la problemoj pri migrantoj, se ja ekzistas specifa problemoj.

La tasko, al kies realigo mi estis tiel kondukita, estas alproksimiĝado al la fenomeno de migrado en la lumo

* Temas pri lernejo, en kiu la estontaj edukistoj lernas sian metion per studado helpe de jam spertaj edukistoj kaj praktika kontakto kun la edukataj junaj deliktuloj.

(Noto de la tradukinto)

de relative freŝdataj okazoj tuŝantaj la enmigrintajn laboristojn.

Tiu dokumento provas ankaŭ akcenti la specifajn problemojn de la infanoj de migrantoj.

* *
*

La dua parto de tiu raporto estas dediĉita al propono por la sinŝarĝado per infanoj de magrebaj enmigrintoj, kiuj estigas - aŭ ŝajnas estigi - plej multe da problemoj en la KE.

* *
*

Mi ne pretendas, ke tiu studo estas tre scienca kaj kompleta (ni lasu iom da laboro al fakuloj); tamen mi postulis de mi mem certan rigoron rilate la fonton de miaj informoj, kaj mi esperas, ke mi ne malproksimiĝis de konkreta realo, tamen ne neglektante analizon, kiam ĝi ŝajnas utila por lumigi certajn donitaĵojn.

La dua parto ne pretendas prezenti definitivajn konkludojn nek malkovri spektaklajn horizontojn. Ĝi nur volas esti eĥo de pripensadoj ekde malgranda sperto en edukaj praktikoj, de multaj renkontoj kaj de priserĉadoj ordigitaj en la kadro de formado de sociala laboristo. Ke ĝi tamen prezentas indikon de proponoj pri profesia praktiko, estas tial, ke ĝi fontas el teoria irado en konstanta rilato kun la ĉiutaga vivo de la edukisto kaj de la ne-plenkreskuloj, kiujn li havas kiel ŝarĝon, en rilato kun la medio, en kiu estas evoluontaj la neplenkreskuloj kaj iliaj gepatroj.

Mi nur deziras malfermi debaton, kaj modeste ĝin nutri per konstruaj elementoj.

Unua parto. Ĝeneralaĵoj.

I - Historio - Enmigra politiko de Francio.

Ĉi tie ni ne pritraktos la fenomenon de sezonaj aŭ landlimaj migradoj, por provi alpreni kaj analizi tiun de la definitivaj aŭ longdaŭraj migradoj, pli proksimaj al la ĉiutaga realo de la edukista laboro ol la mallongdaŭraj aŭ okazaj migroj.

Oni povas distingi kvin ĉefajn stadiojn en la evoluo de la enmigra fakto en Francio de post la komenco de la XXa jarcento.

- unua fazo, kiun ni povas kvalifiki "aktiva", en la komenco de la jarcento, kaj kies forta tempo situas dum la milito 1914-18.
- dua, kvalifikebla kiel "pasiva", de 1931 ĝis 1945.
- tria, aktiva, komenciĝas post la dua mondmilito kaj finiĝas en la komenco de la jaroj 1960 kaj sekvantaj.
- kvara, pasiva, daŭras de proksimume 1960 ĝis 1972.
- la kvina fazo, kiun oni povas kvalifiki "negativa", estas daŭranta de post 1972.

La fazoj, kiujn ni nomas aktivaj, estas la periodoj, dum kiuj Francio vokadis al fremda laboristaro; la fazoj pasivaj estas tiuj, dum kiuj Francio ricevadis enmigradon malmulte aŭ tute ne kontrolitan; en la nuna fazo, "negativa", Francio rifuzas la tradician fremdan laboristaron.

1. 1914 + 1931, fazo aktiva.

Prizorgante pri la "vakuoj" kreitaj de la mobilizado, la francaj registoj, inter 1914 kaj 1918, vokas 1 500 000 fremdajn laboristojn, kiuj anstataŭas la laboristojn soldatiĝintajn, en ĉiuj sektoroj de ekonomia aktiveco en

Francio.

Inter tiuj laboristoj, iuj instaligis ĉirkaŭ la tradiciaj lokoj de ekonomia aktiveco, en kiuj ili estos nemalhaveblaj sekve de la hommanko fine de la milito. La perdoj kaŭzitaj de la milito estis eĉ tiel grandaj, ke la franca registaro devis kontrakti akordojn kun Polio, Ĉeĥoslovakio, Belgio kaj Italio, por ricevi konstantan alportadon de laborforto.

Tial la nombro de la fremdaj laboristoj instalitaj en Francio kreskis de 1 500 000 en 1921 ĝis 2 700 000 en 1931.

La idoj de la laboristoj importitaj dum tiu periodo retroviĝas ĉirkaŭ la grandaj centroj de industria aktiveco, fakte rezervitaj al certaj laboristoj laŭ ties nacieco : tiel, por ekzemplo, gravaj kernoj da Poloj sur la ebenaĵoj de la karbominoj en la departementoj Nord kaj Pas-de-Calais; kernoj da Italioj en Sud-Okcidento kaj en la suda parto de Loreno.

Jam en tiu epoko naskiĝis komencoj de ksenofobio, kies spuroj, malpli motivitaj, retroviĝas nuntempe en la samaj regionoj. Frapa estas la ekzemplo de Courrières * : 1 200 ministroj mortas en katastrofo; por ilin anstataŭigi, oni vokas polajn ministrojn; la urbetanaro prenos ilin por germanoj, kaj dum la milito ili apenaŭ evitos masakriĝon en la lernejo, en kiu ili estos malliberigitaj.

Miskompreno, manko je informado, izoliteco, jen estas la karakterizoj, kiuj ĉirkaŭas ĉiun ĉeeston de migrantoj, kie ajn kaj kiam ajn.

2. 1931 + 1945. Fazo pasiva.

La tutmonda ekonomia krizo moderigis la enmigradon en la komenco de tiu periodo. Francio neniel bezonis importi laborforton por funkciigi sian industrion, draste trafitan de la krizo : pluso da laborforto estus neutila, ĉar jam tropleno da laboristoj kreskigas la aron de multaj senlaboruloj. Importi laborforton en kriza periodo, tio povas esti rimedo por solvi problemojn pri kreskado de salajroj, se inertmaso de senlaboreco konservita per la enlanda po-

* Courrières, pr. Kurjer', dep. Pas-de-Calais. Katastrofo en 1906 (eksplodo de mingaso).

polo ne sufiĉas por silentigi la laboristajn postulojn; sed, en la preciza kazo de Francio inter 1936 kaj 1938, la mobilizado de la popolmaso estis tro grava, por ke oni povu riski krudan manovron, kiu pligravigus la mal-kontentecon - jam gravan - de la franca popolo.

Tamen, inter 1936 kaj 1939, Francio akceptis nombron da rifuĝintoj forpelitaj de sia lando per civilmilito; sed tiun enmigradon oni ne povas rigardi kiel tradician alporton de kruda laborforto, ĉar la plimulto el la rifuĝintoj alvenis en Francio kun sia familio. La hispanoj tiam venantaj en Francion ne serĉas laboron apriore, ili fuĝas el la frankista (falangista) reĝimo.

Ankaŭ dum la tuta milito 1939-1945, ne estas konstat- ebla grava enmigrado *.

3. 1945 + 1960. Fazo aktiva.

De 2 700 000 en 1931, la nombro de la laboristoj en- migrintaj en Francio malkreskis ĝis 1 743 000 en 1946.

La sekventa tabelo ebligas komparon de la enmigra evoluado laŭ naciecoj, kun la postaj tabeloj laŭ perio- doj.

Fremduloj en Francio laŭ nacieco en 1946.

<u>Italoj</u>	<u>Poloj</u>	<u>Hispanoj</u>	<u>diversaj</u>
451 000	422 500	302 000	566 000

La fako "diversaj" koncernas la migrantojn, kies nom- bro estos detalita pli poste : marokanoj (16 000 en 1954), alĝerianoj, portugaloj, jugoslavoĵ, ĉeĥoslovakoj, tur- koj...

Kiel ĉiu milito, la dua mondmilito malfortigis apar- tan tavolon el la popolo : nome la viroj de 20 ĝis 45 jaroj, tio estas la aktiva popolo, kaj ĝia nombro draste reduktiĝis inter 1939 kaj 1945. La rekonstruado de la franca industrio povis esti entreprenita nur per grava alporto de laborforto : la registaro en 1945 vokos al helpe de eksterlando kaj komisios la reguladon de la en- migroj al Nacia Ofico pri Enmigrado (Office national

* dum tamen multaj francaj laboristoj estis militkaptitoj, kaj kelkaj estis trude dungitaj en la germana industrio; sed estis ja celo de la okupantoj kaj de la franca "kun- laboranta" reĝimo ruinigi la francan industrion, por fari el Francio nur-agrikulturan nacion. (N.d.l.tr.)

d'immigration, O.N.I.)

Dependante kune de la Ministerio pri Laboro kaj de la Ministerio pri Publika Saneco kaj Loĝado, O.N.I. decidis longtemplimajn dispoziciojn, planante enmigradon super dudeko da jaroj, "la tempo necesa por rekonstrui aktivan loĝantaron".

Al iniciato de O.N.I. la fremdlandaj laboristoj ventintaj en Francion ŝuldas la ankoraŭ nun validan reglamentaron : laborkarto, loĝatesto (ĉi tiu freŝdata, por la renovigo de la kartoj), medicina atesto, restadkarto. Tiel, ĝis ĉirkaŭ 1960, O.N.I. kontroladis la plimulton el la envenoj de enmigrantaj laboristoj, plisupligante aŭ plirigidigante la formalaĵojn laŭ la bezono pri laborforto. La agado de O.N.I. havis sian plej belan tempon inter 1947 kaj 1960, dum la sinsekvaj mobilizadoj pro la militoj en Hindoĉinio kaj Alĝerio.

4. 1960 + 1972. Fazo pasiva.

Ekde 1960, la kaŝaj eniroj de laboristoj pli kaj pli oftigis. Ĉar la ekonomia stato de la laborist-provizantaj landoj ja ne pliboniĝis en rilato kun la pligrandiĝo de la bezonoj, la enmigraĵoj fariĝas pli kaj pli multaj, dum la tempolimoj postulataj per la reglamentaro de O.N.I. estas longaj, multe tro longaj por ili.

Multaj migrantoj transas la reglamentojn kaj trapasas la landlimojn sen la necesaj paperoj. Elvolviĝas paralela negoco pri laboristoj, dum migrantoj venas en Francion kiel "turistoj", esperante, ke ili poste legitimigos sian situacion. Ĉi tiuj restas longatempe kiel sezonuloj, en konstanta danĝero pri kontroloj, kaj submetataj al sen-skrupulaj mastroj, kiuj dungas ilin sen kontrakto kaj sen deklaro al la oficiala aŭtoritato kaj al la Socia Asekuro.

Tiu aro de enmigraĵoj venas plejparte el Alĝerio kaj Portugalio. Fakte, jam en 1964 estas kontrolita nur 46 % el la eniroj. Ĉar la "eksterleĝa" transmigrado pliampleksiĝis, dum la jaroj 1967 kaj 1968 O.N.I. kontrolis nur 25 resp. 20 % de la importado de laboristoj. En Francio en plena ekspansio, ĉar ĉia kontrolo preskaŭ malaperis, la fluktuado de la dungomerkato estas eksterordinara. Ni pli detale vidos tiun aspekton en ĉ. III.

5. 1972 + 1975. Fazo negativa.

Januaro kaj februaro 1972, tiu epoko faras makulon en la historio de enmigrado en Francion.

Dum la periodo ekde 1960, la socia situacio de la enmigrintoj profunde modifiĝis : ŝvelado de rasismo, patologiigado de la "migrant"-problemo, multobligado de la "bidonvilles"*... Mallonge, la registaro, kvazaŭ oficialigante la kaŝan enmigradon, preparis la francan popolon al socia forĵetado de la enmigrintoj.

Komence de 1972, la cirkuleroj de Marcellin (ministro pri internaj aferoj - polico) kaj Fontanet (ministro pri laboro) trudas al enmigrantoj tre precizajn kondiĉojn por eniro kaj instaliĝo. Enmigrinto devas prezenti loĝateston por ricevi, en la plej favora okazo, la tradiciajn laborkontrakton kaj restadpermeson; la cirkuleroj aldonas plian malfacilaĵon : la unua dungo ne havigas laborkarton; ili reduktas la eniradon de "turistoj", forigante la eblecon de eventuala validigo (kiu, antaŭe, estis jam malfacila).

La cirkuleroj Marcellin-Fontanet, ĉe unua lego, ŝajnas ne sen bonaj intencoj; sed, aplikate, ili produktas tiajn konsekvencojn, ke ili estas tre malfavore akceptitaj de la fremdaj loĝantaroj freŝdate alvenintaj en Francio.

Per malsat-strikoj kaj manifestacioj la enmigrintoj sukcesis ricevi modifojn, kiuj plisupligas la reglamentojn, en somero 1973. Sed tio estis regreso por posta salto pli antaŭen.

Efektive, unu jaron post sia atingo al potenco, S-ro Giscard d'Estaing (respublik-prezidento) kreis ŝtatssekretarion pri enmigrantaj laboristoj; sed jam en somero 1974, li kun sia registaro decidis haltigi la enmigradon, komence nur provizore, poste, la 9an de oktobro samjara, por nedefinita daŭro.

La sekvo estis tuja malplialtiĝo - je 58 % - de la enmigrado en la dua duonjaro 1974.

Tiu malaltiĝo, kiun oni povus kredi volita de la registaro, estas fakte kompensita per voko al laborforto "de

* bidonville ("ladvaz"-urbo): tiel estas nomataj la ĉirkaŭurbaj kvartaloj el barakoj, loĝejaĉoj, en kiuj amase vivas, sen plej elementaj kondiĉoj de higieno kaj bonstato, mizera "ĉifonproletaro".

senpera importo", epizoda. Nombro da entreprenoj, ekzemple en konstrufako, importas per ĉart-aviadiloj, por limigita daŭro, unu aŭ plurajn taĉmentojn da pakistananoj aŭ jugoslovoj, kiujn ili resendas al iliaj landoj, tuj kiam la tasko estas plenumita. En terkulturado, sezonlaboristoj venas per propraj rimedoj, estas maldungitaj sur la loko post ofte tre mallonga periodo, kaj tiel konsistigas kaŝan amason, kiu baldaŭ organiziĝos.

La ekspluatado al la laboristoj estas en tiuj okazoj ankoraŭ pli okulfrapa ol en la tradicia enmigrado. Sammaniere laboras forst-ekspluatataj entreprenoj okupantaj en Pireneoj aŭ Cevenoj turkojn izolitajn disde la normalaj cirkvitoj de la dungomerkato kaj de la sociaj retaroj. Al la entreprenoj, kiuj ĝin utiligas, la tiele importita laborforto kostas malplimulte ol la enlanda loĝantaro aŭ la tradiciaj enmigrintoj.

La limigo de la kutima enmigrado estas protekto kontraŭ la kreskanta konsciiĝo de la enmigrinta laboristaro pri politikaj kaj sociaj problemoj, kaj kontraŭ la pli kaj pli alta kosto de la tradiciaj migrantoj, kompare kun la kosto en la antaŭaj jaroj.

* *
*
*

La bilanco ĉerpebla el tiu mallonga historio estas nemulte flata, tiel por la eksportantaj landoj kiel por la importantaj, nome Francio inter tiuj lastaj.

La enmigranta laboristo estas ja akceptata ne kiel laboristo, sed kiel varo kun fluktuanta valoro : en periodo de "fortaj" tempoj (postmilita ekonomio, ekspansio), la migranto estas varo de sekura valoro por la eksportanta lando, kaj bonvena por la importa. Oni lin interŝanĝas pere de komercaj interkonsentoj. Kiam "ĉio iras mise", la enmigrinta laboristo sola portas la konsekvencojn de ekonomia aŭ socia krizo. Ĉe la avangardo de "struggle for life" *, la migranto pagas la koston de la ŝparemo kaj de la bonvolo de la regantoj de la okcidenta mondo kaj de la "triamondaj" regantoj ilin servantaj.

Ĉiuj migrantoj, ĉu sezonaj, ĉu daŭraj, ĉiuj laŭbezzone estas importataj aŭ eksportataj, bonvenaj aŭ forpelataj, svingataj inter la multopaj reglamentoj, kiuj atentigas nur pri la maksimuma rentoprodukto de tiuj altvaloraj produktiloj.

* Struggle for life : porviva luktado.

II - Kial "ili" migras.

1. Deveno de la migrantoj.

"Ili" venas de ĉie : grandnombre de la Magrebaĵ landoj, multe de Portugalio... kun ampleksaj varioj laŭ la epoko kaj la ekonomia kaj politika konjunkturo.

Nacio	1964	1967	1970	1973
Alĝerio	510 000	530 000	697 316	817 000
Belgio	80 673	75 456		63 832
Hispanio	585 210	640 116	601 095	570 595
Italio	680 857	660 563	592 737	572 803
Jugoslavio	21 831	42 830	56 091	79 345
Maroko	77 347	112 479	170 835	269 680
Polio	144 972	128 187	197 369	91 059
Portugalio	157 394	330 000	667 069	812 007
Tunizio	46 749	42 830	56 091	79 345

Tiu tabelo montras la evoluadon laŭnacie de la enmigrado en la lastaj jaroj (ĵurnalo "Le Monde" junio 1974).

Etkampuloj el Susso (Tunizio) kaj maroka Rifo, senlaboruloj el la grandaj urboj tuniziaj kaj alĝeriaj, reĝimopoziciuloj el Portugalio, ĉiuj, pro iu aŭ alia motivo, estas nedezirindaj en sia devena lando.

Politikaj, ekonomiaj aŭ sociaj nedeziratoj, ili konsistigas kontingenton da viroj kaj virinoj pretaj al ĉio ajn por forigi la jugon, kiu pezas sur iliaj ŝultroj. Ili estas proprietuloj aŭ farmistoj de etprodukta grundo, jam ne sufiĉa por nutri ilian familion; ili estas terkulturaj laboristoj de mastro, kiu maldungas sekve al mekanikigo de sia ekspluatado; ili estas el tiuj nenombreblaj senlaboruloj vagantaj en la antaŭurboj de industriaj centroj; ili estas neproduktantoj en sia lando, kaj densigas la vicojn de tiuj, kiuj, ŝarĝo por la kolektivo, estas viktimoj de politika elekto pri ekonomia elvolviĝo.

Entuziasmigite per la voĉo de la nacia propagando kaj per tiuj, multopaj, de iliaj antaŭuloj, ili vidas Francion kiel "Kanaan-london" de ĉiuj parioj el la tria-mondo.

Ili venas de la superloĝataj antaŭurboj de Konstantino kaj Alĝero, de Kasablanko kaj Rabato, de la malhumanaj industriaj urbegoj de Ljubliano kaj Zagrebo, allogite de

la "planklumoj" de la franca marbordo.

Ŝparamasiginte pli malpli facile la prezon de sia transporto (altega por la mallicaj enmigrantoj), ili jam antaŭkonas la civiton de senmezuraj dimensioj, en kiuj ili loĝos : Parizo, Liono aŭ Marsejlo... Tiuj estos malpleje misorientiĝintaj, kiuj ne havas, krom la lingva handikapo, tiun de kampara origino...

2. Kaŭzoj de migrado.

Kutima tezo tendencas limigi al ekonomiaj kondiĉoj la motivojn de migrado.

Unuavide, ekzemple en nordafrikaj landoj, la malekvilibro inter la demografia premo kaj la kreskado de nutrovaro estas nekontestebla; same ne estas neigebla la freŝdata inversiĝo de la rilato supernaskado / loĝejkvanto en tiuj landoj. Tiuj malekvilibroj, certe, estas zorgonaskaj sed ili neniel pravigas la helpovokon al migrado. Ja, kiel senpera konsekvenco de la iama koloniigado, la plej progresintaj aktivec-sektoroj estas komplementaj de la francaj industriaj sektoroj, dum la prema bezono de tiuj landoj estas, evidente, kolosa penado en la unuagrada sektoro kaj en la duagrada de ĝi dependa. Desovaĝigi, kultivi, akvumi kaj semi devus esti la ĉefaj celoj de la Magrebaj regantoj. Orientante al tiuj sektoroj la ekonomian politikon, devus esti eble en Maroko redukti la kreskantan marginon inter provizoj kaj nutrobezonoj, en Alĝerio redukti la same kreskantan marginon inter peto kaj oferto pri loĝejoj.

Necesas serĉi pli profunde la fundamentajn kaŭzojn de la migrado, kaj ne malfruiĝi ĉe supraĵaj faktoj, kiuj estas nur motivigoj por la migrantoj kaj pretekstoj por la instigantoj.

"Ili" migras tial, ke ilia registaro briligis al iliaj okuloj larĝan ventumilon da avantaĝoj (fakte, grandparte iluziaj).

Neproduktivaj en sia lando - do nedezirindaj - ili fariĝos produktivaj, tiom por sia lando (per importado de devizoj), kiom por la akceptanta lando (per sia rolo en la produktado, rolo ne malhavebla en la ekonomio de la utiliganta lando), kaj por la ekonomiaj rilatoj inter ambaŭ.

Nekvalifikitaj (kaj tio estas argumento de la importantaj landoj), ili lernos metion, kaj, tiel kvalifikitaj,

ili ĉe sia reveno alportos al sia lando profitdonan laborforton.

Dank'al ŝparado efektivigita dum sia ekzilo, ili povos fronti la bezonojn de sia familio restinta en la lando aŭ ilin akompaninta...

Ĉiuj tiuj argumentoj, prezentataj de la responsuloj en la koncernaj landoj, estas iluziaj aŭ erarigaj.

Fakte, la valoro de la importitaj devizoj estas reduktita pro la devalutoj; la efektivigitaj ŝparoj estas investitaj en entreprenojn malmulte produktivajn por la lando (taksioj, drinkejoj, etkomercoj...) aŭ konfeditaj al bankoj, kiuj utiligas ilin pli al monhavigaj celoj ol al celoj produktivaj por la nacio.

Koncerne la eventualan kvalifikigon, pri kiu povus profiti la fremduloj instalitaj en Francio, tio estas la ĉefa trompslogano de enmigrado : kiom da portugalaĵ ŝulflikistoj fariĝis en Francio masonistaj helplaboristoj; kiom da jugoslavaĵ kultivistoj plenigas la vicojn de la muntoĉenoj kiel "specialigitaj laboristoj" *; kiom da laboristoj, metiistoj, komercistoj, kiuj estis en sia lando spertaj kaj kapablaj, densigas en Francio la vicojn de la malplej kvalifikitaj laboristoj ? Tiuj ĉi estas multe pli multaj ol supozigas la asertoj de ĉiuj koncernaj registaroj. Ni reprimtrakto (ĉ. III, 1) la dispartigon de la enmigranta laboristaro en la franca profesia loĝantaro.

Utiligataj en Francio kiel reguligoj de laborforto, reguligoj de salajroj, rompantoj de strikoj kaj de sindikataj agadoj, laŭ la bezonoj kaj sub minacoj de la mastraro; malmultekostaj kaj bonkvalitaj iloj por ĉiuj taskoj malŝatataj de la enlanda laboristaro ĉar lacigaj aŭ danĝeraj, la enmigrantaj laboristoj estas "nekonsciaj viktimoj de la ekonomia sistemo reganta en la okcidenta mondo kaj de ties lakeoj", dum ili kredas servi la aferon de sia origina nacio, kaj eltiri sin el mizero.

3. Mekanismoj de migrado.

Ekstreme skemigante, oni povas diri, ke la migranta laboristo estas kambia mono inter landoj elvolviĝintaj kaj

* Oni nomas en Francio "specialigitaj" tiujn laboristojn sen profesia kapableco, kiujn oni "specialigas" por ege simpla tasko sur maŝino aŭ en ĉeno, kie ili dum la tuta labortago ripetadas unu aŭ kelkajn aŭtomatajn gestojn.

kaj landoj pudore nomataj "elvolviĝantaj".

Ja verŝajne, komercaj traktatoj regas la transmovojn de laborforto super la landlimoj : "Vi donos al mi tiom da laboristoj (kies edukado kostos al mi nenion), mi bone-malbone eltrovos por ili okupon; mi loĝigos ilin, kiel mi povos; mi iafoje profitigos ilin je socia asekuro; kaj, interŝange kontraŭ tiuj etaj servoj, mi aĉetos de vi kelkajn bagatelojn, kiujn vi produktas, kaj mi havigos al vi kelkajn facilajojn por aĉeti miajn eksportproduktojn." Jen kia estas sendube la parolo de la "akceptanta" lando.

Tiel la migranta laboristo povas fariĝi ĉantaĝa armilo (tamen kun duflanka tranĉrando); en 1971 Francio malpliigis la alĝerian enmigradon sekve al la naciigo de petrolbienoj en Alĝerio; en 1973 Alĝerio haltigis la migradon por protesti kontraŭ la oftajn atakojn kaj rasistajn agresojn, kies viktimoj estis alĝeriaj devenuloj.

III - Rolo de la enmigrintoj en la franca vivo.

1. Ekonomia rolo.

La proporcio de la aktivuloj en la migranta loĝantaro estas multe pli granda ol la franca meznumero.

Proporcio de fremduloj kaj aktivuloj en la franca loĝantaro en 1973 (Fonto : CNPF - Nacia Konfederacio de Franca Mastraro)

Loĝantaro	miloj			%	
	Franca	Fremda	Sume	Franca	Fremda
Totala	48 224	3 776	52 000	92,7	7,3
Aktiva	19 288	2 492	21 700	88,56	11,44
Aktiva/totala	40 %	66 %	41,8 %		

La laboristo el eksterlando alvenas plenkreska. Tio signifas, ke la akceptanta lando ne devas elporti la ŝarĝon de lia "bredado", se tiel diri, nek de lia edukado. Lia laboro estas tuj profitdona por Francio.

Nu, estas kalkulite, ke franca laboristo alvenanta en la laboristaro jam kostis 150 000 FF je la aĝo de 18 jaroj (t.e. antaŭ la aĝo de supera instrua ciklo); li far-

igos vere produktiva nur post kelkaj jaroj da profesia aktiveco. La responde kosto, en la kazo de enmigrinta laboristo, estas elportita de lia devena lando.

Plie, - se kelkaj kunvenigas sian familion en la akceptantan landon kaj tie instaligas, - multaj forlasas Francion antaŭ ol ili laboris la minimuman tempon por rajti je pensio (15 jaroj), kaj ne estos en pozicio por validigi sian rajton en la koncerna tempo; tamen ili kotizadis, kiel ĉiuj laboristoj, por la sociala maljunecasekuro : iliaj kotizoj restas akiraĵo de Francio.

Endas aldoni, ke multaj el la enmigrintoj, junaj viroj, estas malofte trafataj de laborĉeso pro malsano; kaj, sen familio en la lando, ili ne postulas repagon de malsan-elspezoj por ĝi.

Fine, pri la familiaj monhelpoj, kiam ili lasis la familion en la devena lando, ili ricevas nur la sumojn validajn en tiu lando; ofte okazas, ke la klopodoj por ilin ricevi, malfacilaj kaj malkuraĝigaj, ne celtrafas antaŭ la reveno en la landon.

De tiuj rimarkoj ni ĉerpas jenan konkludon : ne nur tute falsa estas la rasista formulo : "Ili venas manĝi la panon de la francoj", sed male, la enmigrinta laboristaro ŝparigas al la sociala asekuro : ĝi kostas malpli ol ĝi profitonas al la franca kolektivo.

1 a/ Okupkondiĉoj de enmigrintoj.

La plimulto el la migrantoj apartenas al la malplej kvalifikitaj partoj de la laborista klaso. 92,2 % estas laboristoj aŭ oficistoj; en 1973 tio signifas 1 748 600 el 1 800 000.

<u>Kategorio de personoj</u>	<u>Numero en 1973</u>	<u>%</u>
Inĝenieroj, kadroj kaj liberaj profesioj	19 800	1,1
Submastroj, teknikistoj	33 600	1,7
Oficistoj	64 800	3,6
Kvalifikitaj laboristoj	482 400	26,8
"Specialigitaj laboristoj" (sen profesia kvalifiko)	721 600	40,1
Helplaboristoj	480 600	26,7

(el Encyclopedia Universalis)

Pli ol 1,5 milionoj da fremdaj laboristoj estas komisiitaj por la taskoj plej lacigaj, plej malagrablaj, plej danĝeraj, malplej alte salajrataj : 20 % el la SMIC*-uloj estas helplaboristoj en konstrufako.

Malbone informitaj pri siaj rajtoj - por plej granda kontenteco de la mastraro - , la enmigrintaj laboristoj estas laborforto obeema, facile movebla, akceptanta, sen postul-aŭdaco, la plej malaltajn salajrojn.

Pro la laborkadencoj kaj danĝeraj kondiĉoj, la enmigrintoj, kiuj konsistigas 22 % el la tuto de la laboristoj en konstru- kaj publiklabor-fakoj, estas la ĉefaj viktimoj de labor-akcidentoj kaj profesiaj malsanoj en tiuj sektoroj. Ankaŭ en certaj industriaj sektoroj.

Procento de la enmigrintaj laboristoj.

Ĝeneralaj aktivec-sektoroj		Sektoroj aparte lacigaj, danĝeraj (proksimume)	
Konstruado kaj publiklaboroj	25 %	pezaj taskoj	80 %
Metalurgio	15 %	fandejoj,	
Minoj	16 %	lamenigejoj	70 %
Agrikulturo	12 %	rubafistoj	
Servoj (domservistoj)	13 %		
Mekanikaj kaj elektraj industrioj	15 %		
Ekz.: Renault	32 %	Billancourt, OS1, OS2	90 %

(Billancourt estas la ĉefa uzino de la nacia firma RNUR, régie nationale des usines Renault, automobil-fabrika.

OS1, OS2 estas la du gradoj de "specialigitaj" laboristoj)

* SMIC : salaire minimum interprofessionnel de croissance (minimuma interprofesia salajro por kreskado /de la aĉetpovo aŭ vivnivelo/) : t.e. la minimuma salajro permesata en ĉiuj profesioj, almenaŭ principe. N.d.l.tr.

Proporcio de la akcidentitaj fremduloj.

Sektoro	Sume	inter kiuj, fremduloj
Konstrufako	350 000	138 500 -- 39,3 %
Cementmalsanoj	1 792	1 699 -- 94,8 %
Metalurgio		20 %
Mina silikozo	4 025	3 839 -- 95,3 %
(1968, 69,70)		

La enmigrintoj okupas la postenojn malplej pagatajn en la sektoroj malplej monhavigaj; plie, multaj el ili estas reale subpagataj kompare kun iliaj francaj similuloj. Jam tio estas ŝpare realigata de la entreprenoj. Alia, potenciala, konsistas el la gajno de laborforto: estas certe, ke la francoj ne povas akcepti la laborkondiĉojn akceptatajn de la fremduloj, tiel pri la taskoj kiel pri la salajroj.

Tio estas plena gajno, plena profito por la franca kolektivo; tamen troviĝas homoj inter la laboristoj, kiuj kulpigas la enmigrintojn. Ili eraras pri la pafocelo, ĉar ne volonte la migrantoj lasas sin ekspluati; la responsulo - kaj eĉ instiganto - de tiu faktostato estas la franca registaro en akordo kun la originlandaj registaroj de la migrintoj.

En multaj okazoj la migrantoj estas regulilo de la franca ekonomio, ĉar ilia ĉeesto, facile movebla, ebligas orienti la strebadon de la ekonomio al altprofitaj sektoroj; ebligas flankelasi la sektorojn malpli konkurencajn aŭ malpli profitdonajn, kies modernigado povas esti ne nepre tuja, kaj kiuj povas daŭrigi sian produktadon uzante laborforton malpli karan (tiel por "aĉeto" kiel por "konservado") ol la mekanikigado.

1 b/ Rajtoj de la enmigrintaj laboristoj.

La plimulto el la fremdaj laboristoj havas en Francio situacion de neniu enviata; la vortoj plej ofte trovataj por karakterizi iliajn vivkondiĉojn estas: penigaj laborkondiĉoj, limigitaj soci-politikaj rajtoj, malbonaj kaj malsekuraj loĝejoj, lamentindaj vivkondiĉoj.

Ni provis konturi la elementajn rajtojn de la migrantaj laboristoj kaj de iliaj familioj; sendube estus pli facile demandi sin pri la malpermesoj, kiujn ili renkontas, pli multaj ol iliaj rajtoj.

Politikaj rajtoj.

La enmigrinta laboristo havas nenium politikan rajton.*

Ni povus ĉi tie halti, sed la fakto estas pligravigita per leĝa dispozicio, kiu ludas tre gravan rolon en ilia vivo : la ordono de la 2a de novembro 1945 preskribas senprokrastan elpelon, se iu fremdulo minacas la publikan ordon (art.23).

Tio signifas, ke kiu ajn fremda laboristo, se li partoprenas en sindikata aŭ politika manifestacio - ĉu ĝi estas aŭ ne minaca al publika ordo - povas esti prezentata antaŭ komisiono, kiu rajtas ordoni lian senprokrastan elpelon, eĉ sen ke li povu sin defendi aŭ ekspliki. La artikolo 25 de la citita ordono ja rajtigas la laboriston sin defendi antaŭ la komisiono, sed fakte, li estas alfrontita senpere al reprezentantoj de la ministerio de interno (polico); efektive, la art.26 preskribas, ke la afero estu direktita al la ministerio de interno en kazo de "absoluta urĝeco". Kiel oni povas diveni, tiu teksto permesas plej fantaziajn interpretojn, tiel diversajn, kiel postulas la momentaj bezonoj.

La minaco pri elpelo kronas ĉiujn subpremajn dispoziciojn, kiuj celas fari el la migrinta laboristo kaj el lia familio objektojn je la servo al potenco kaj mastraro, obeemajn laboristojn, moveblajn kaj submetitajn, por plej granda rentumado de la entreprenoj kaj plej granda profito al grandkapitalo.

Sindikataj rajtoj.

Ĉiuj sindikataj rajtoj, kiujn ĝuas nun la enmigrintaj laboristoj, estas akiraĵo malrapide deŝirita de la regna potenco per obstina luktado far la migrantoj mem aŭ la francaj sindikatoj.

Freŝadata ekzemplo : en 1973, nombro da migruloj komencis malsat-strikon kun slogano signifa pri ilia mal-espero : "Ni mortos por vivi."

Teorie, ne ekzistas plu diskriminacio inter francaj kaj enmigrintaj laboristoj. Fakte, la diskriminacioj, multaj ĉe la nivelo de dungado, daŭre sentigas sin, tiel ĉe la sindikata kiel ĉe la socia nivelo. La taktiko plej

* Por ekzemplo en alia lando ni notu : en Belgio la enmigrintoj rajtas voĉdoni en certaj urbestraraj balotoj.

kutime uzata por ĉesigi la sindikatan agadon de tiu aŭ alia migranto, estas utiligi la ordonon de 1945, antaŭe menciitan. Rapide transpasita estas la paŝo, kiu resendas portugalan laboriston al Portugalio, aŭ marokanon trans Mediteraneon.

Se ne atenti tiujn hipokritajn agmanierojn de la regna potenco, al enmigrinta laboristo estas oficiale agnoskataj :

- la rajto aliĝi al iu sindikato.
- la rajto partopreni en ĉiuj profesiaj voĉdonoj : balotelekto por delegitoj de la personaro, por membroj de la entrepren-komitato (depost 1973).
- la rajto partopreni en ĉiuj sindikataj aktivecoj.

La listo de tiuj rajtoj povus kredigi, ke la kondiĉaro de la enmigrintaj laboristoj ne estas tre diferenca de tiu de iliaj francaj similuloj.

Grave estas akcenti, paralele, la limigojn al tiuj rajtoj :

- en la sindikatoj, la enmigrintoj ne rajtas havi administrajn aŭ gvidajn funkciojn.
- ili ne rajtas esti sindikataj delegitoj. (februaro 1976 : kelkaj plibonigoj estas ĵus enportitaj en tiuj limigoj, tamen sen profunda modifo de ilia graveco aŭ signifo)
- ili ne estas voĉdonantaj, kaj a fortiori elekteblaj en la laborprocesaj konsilantaroj (conseils des prudhommes : profesiaj tribunaloj konsistantaj en egalaj nombroj da mastraj kaj salajrataj reprezentantoj, kiuj juĝas procesojn pri aplikado de laborjuro en dungado kaj maldungado, klasigado kaj salajroj, aplikado de la leĝoj pri sekureco, laborkondiĉoj, pri sindikataj rajtoj, ktp.)
- ili ne estas elekteblaj en la agrikulturaj konsilantaroj.
- en la entreprenoj, ili estas elekteblaj, nur se ili scipovas legi kaj skribi franclingve; tiu preskribo estas aparte limiga, ĉar multaj enmigrintoj estas malmulte instruitaj, precipe en franca lingvo.

Tiuj diversaj rajtoj, kies teoria listo permesas ne similigi la enmigrintan laboriston al sklavo, tamen restas, ĉar makulitaj per la limigoj ilin akompanantaj - inter kiuj la ordono de 1945 - unu el la plej certaj rimedoj por muzelingi la gravan amason de la enmigrintoj. Al tiuj di-

versaj malpermesoj aldoniĝas plia diskriminacio interne de la migrularo mem : la egaleco en sindikataj rajtoj estas oficiale konsentita nur al la anoj de landoj apartenantaj al la Eŭropa Ekonomia Komunumo.

Ĉiuj tiuj kondiĉoj permesas al la mastroj ekspluatadi la migrintajn laboristojn en plena senpuneco, por sia profito, por tiu de la importanta lando, kaj sekve por tiu de la franca socio.

Juraj garantioj.

En okazo de malobeo al la "leĝo", kiu regas ilian ĉeston sur la franca teritorio, la laboristoj estas submetitaj al unu nura aŭtoritato : estas ja la ministerio de interno, kiu regas la tutan proceduron pri enmigrado. Ĝi difinas la kondiĉojn por restado, juĝas la malobeojn kaj zorgas pri la aplikado de la leĝo. Plej okulfrapa ekzemplo estas la elpela proceduro, kies karakterizoj estas ĉi-supre difinitaj (p.20). La elpelato - kiom da enmigrintoj troviĝas en tiu kazo ! - povas esti resendata al sia lando, sen ke oni lasis al li ian iniciaton por sia defendo, kaj eĉ sen ke oni sciigis al li la motivojn de lia resendado. La elpela proceduro, karakteriza pri la for-esto de jura garantio por la enmigrintoj, estas plene kontraŭdemokrata procedo, kiu submetas la migranton al unika instanco, ekskluzivante ĉian apelacion, kaj ĝi estas politike ne neŭtrala.

2. Politika rolo de la enmigrintoj en la franca vivo.

1 800 000 enmigrintaj laboristoj, tio estas grandega kvanto da laborforto, translokigebla (jam dirite), obeema - aŭ pli ĝuste obeemigita - ne kvalifikita - aŭ ne pretendanta pri kvalifiko -, kiu estas vaste utiligata por aplikadi premon al la franca laboristaro.

En ĉiu agado de ĝi entreprenata, la sindikata movado ne povas kalkuli pri subteno de la migrolaboristoj, muzelingitaj per leĝoj ege subpremantaj, kaj ĝi troviĝas malplifortigita rilate al la aŭtenteco de siaj postuloj. La enmigrintaj salajruloj ne moviĝas, ne povas moviĝi. En okazo de konflikto inter mastraro kaj sindikato, ili estas maso, kiun ĉiu el ambaŭ partioj povas preni kiel ateston pri la ĝusteco de siaj asertoj, sen povi pruvi ĝin (sed, feliĉe, sen eblo pruvi la malon). Plie, kiel

ni pli supre akcentis, la ĉeesto de malkara laborforto en Francio permesas orienti, selekti, eĉ tute ŝpari kolektivajn investojn. La 6a plano estas ja orientita al la supropintaj industriaj sektoroj, ege profitdonaj.

Neglektante la ne-konkurencajn aŭ malalt-profitajn sektorojn, kiuj ne postulas tujan modernigon, la 6a plano antaŭvidas enkondukon de kapitaloj en la pintajn industri-sktorojn, internacie konkurencantajn. Tiel estas preterlasataj la konstrua, publik-labora kaj teksaĵa industrioj. Tiu neglektado estas permesita, eĉ alvokita per la ĉeesto en tiuj sektoroj de enmigrintaj laboristoj, iloj malpli multekostaj ol grava maŝinizado aŭ renovigo de la ilaro. La ĉeesto de fremdaj laboristoj, dank'al ilia malalta kosto, kompensas la nesufiĉan produktivecon de la infrastrukturo kaj de la maŝinaro sidantaj en tiuj sektoroj. Same, teme pri edukado kaj loĝigado, la fremda laboristaro ebligas gravajn ŝparojn. Tiun temon ni poste repritraktos.

Estas direble, ke koncerne ekonomion kaj politikon, la enmigrinta laboristaro faciligas, en mallonga templimo, la solvon al multaj problemoj.

3. Demografia rolo kaj socia situacio.

En la historio pri migrado ni vidis, ke post la fino de ĉiu milito, la importado de fremdaj laboristoj vaste kontribuis al demografia relevigo de la situacio per tre grava alporto de juna loĝantaro, kiu ebligis plenigi la deficiton de la franca popolo.

Tiu juna loĝantaro ne nur plenigas la deficiton kaŭzitan de la internaciaj konfliktoj, sed plie, dank'al naskado pli alta ol la franca meznombro, ĝi kreskigas la nasko-procenton, kaj tiel la demografian kreskoprocenton.

Jam dekon da jaroj, la kreskoprocento de la loĝantaro en Francio estas proksimume 10 %. El tiu kreskado, proksimume triono venas de la fremda loĝantaro, ĉu pro enmigrado, ĉu pro naskado. En 1971, preskaŭ 104 000 naskitaj infanoj havis fremdan patron aŭ patrinon, aŭ ambaŭ, dum en la sama jaro la nombro de naskiĝoj estis sume 617 000. Se konsideri la tuton de la natura kreskado de fremda loĝantaro kaj de la enmigra alporto, oni konstatas, ke proksimume 50 % de la franca demografia kreskado venas de la fremdularo. Por ekzemplo, en 1970, enmigrado kaj naskado de fremduloj alportis 270 000 personojn el sumo de 480 000 personoj de

totala kresko, t.e. 56 %.

3 a/ Geografia dislokigo.

Unua grava fakto estas substrekenda : 59 % el la fremduloj estas koncentritaj en tri francaj regionoj : Pariza regiono, Rodano-Alpoj, Provenco-Lazurmarbordo.

La ĉefaj punktoj de instaligo de migrantoj estas la zonoj kun forta industria aktiveco, en kiuj la labormerkato estas favora. Ni citu ekzemple : Parizo, Liono (120 000), Marsejlo (90 000), Grenoblo (60 000), Nico (35 000), Lilo-Rubezo-Turkuengo (35 000)...

La denseco de la fremdularo en la totala loĝantaro de la regiono estas jena :

Parizo 12,5 %, Korsiko 21,2 %, Provenco-Lazurbordo 10,6 %, Rodano-Alpoj 10,1 %, Langvedokó 9 %, Loreno 8,9 %, Franĉkomteo 7,2 %.

3 b/ Loĝkondiĉoj.

- "... 144 gvineaj laboristoj estas jam tri tagojn sen tegmento. La gastejo, en kiu ili loĝis, str. P... en la 20a arondismento, disfalis dum la lasta fulmotondro, kiu atakis la ĉefurbon..."
- "... tri alĝerianoj mortis lastan nokton en la "bidonville" de A... La kaŭzo estas atribuebla al misa funkciado de la forno, en malbona stato..."

"Bidonvilles", gastejoj ASSOTRAF aŭ SONACOTRA *, meblitaj hoteloj, la migrantoj amasiĝas en malsanaj loĝejoj, en barakoj sur laborterenoj, en ruinoj de kvartaloj en renovigado.

Kiel eble plej proksime de sia laborloko, en specoj de gettoj, ili serĉadas kompanion de samlandanoj por esti ne tro izolitaj kaj ne tro malproksimaj de eventuala helpo. Portugaloj en la 14a kaj 15a arondismentoj, "medina"j * en la norda antaŭurbo de Parizo, Villeurbanne kaj Mermoz en tiu de Liono, "nordaf" kvartaloj, "Haarlem" en Marsejlo... la migrantoj grupiĝas en la kvartaloj, en kiuj la

* ASSOTRAF : Asocio de Afrikanaj Laboristoj.

SONACOTRA : Nacia Koopera Societo de Alĝerianaj Laboristoj.

medina : araba kvartalo.

nordaf : nord-afrikanoj

Haarlem : nigrula getto

"standing" (vivnivelo) malaltiĝis laŭgrade de ilia okupado. Unuiĝinte por esti ne tro perditaj en tiu vivo tiel malsimila de ilia ĝistama, ili baldaŭ troviĝas izolitaj, flankenigitaj, ĉar la francoj forlasas la kvartalon.

La migrantoj, konsistigante 9 % el la loĝantaro en Francio, okupas 25 % el la malbonaj loĝejoj.

Loĝado de la migrantoj, j. 1974 :

45 % (1 819 350) en "meblitaj" hoteloj (malkomfortaj)
 35 % (1 415 050) en barakaroj, "bidonvilles", malsanaj
 domaĉoj.
 20 % (808 600) en HLM * kaj individuaj loĝejoj.

Ĉe la loĝado retroviĝas la samaj ekspluat-kondiĉoj kiel ĉe la dungado. Ĉi tie, simile al la mastroj, fiagas la "dormo-vendistoj". Ili loĝigas kvantegon da enmigrintaj laboristoj en teruraj kondiĉoj : po 10, 12, 15, iafoje eĉ pli sur kelkaj kvadratmetroj. "Racia" okupado estas efektivigata per loĝigado de skipoj, kiuj, laborante laŭ 3 x 8 *, dormas laŭvice sur sama loko.

Ne bezone diri, ke la gajnoj estas gravaj, eĉ se la individua luprezco ŝajnas modera. Ekz. : gastejo ASSOTRAF en Pariza regiono, 1971; eks-fabriko, en kiu loĝas 270 fremdaj laboristoj; la individua luprezco estas 70 FF monate; sumo de la luado 18 900 F (por 15 "ĉambroj" 12-kvadratmetraj... almenaŭ profitige !) Nu, ASSOTRAF estas subvenciata de FAS * : kien iras la mono de FAS ŝuldata al la migrantoj ?

Tiuj kelkaj ciferoj ŝajne indikas ĉu totalan miskonon de la publika potenco pri la loĝproblemo, ĉu miskonon de la migrantoj pri siaj rajtoj, ĉu mankon je funkciaj loĝejoj proksime de la laborlokoj. Ni devas flankelasi la unuan hipotezon pro evidentaj motivoj. La duan ni ne priatentos, ĉar, se la enmigrintoj komence ne konas siajn rajtojn (cetere limigitajn), ili baldaŭ ekkonos la plimultajn el ili. Ni do devas ankoraŭfoje akuzi la registaran politikon pri loĝado, kiu vole iradas kontraŭdirekte

* HLM : habitations à loyer modéré (loĝejoj kun modera luprezco). Apartamentoj sufiĉe modernaj kaj komfortaj, en vastaj domegarejoj, en kiuj loĝas laboristoj kun sufiĉe alta salajro.

3 x 8 : tri skipoj laboras alterne, ĉiu po 8 horoj en ĉiu tagnokto (PIV : triskipa laboro).

FAS : Fonds d'action sociale (fonduso por sociala agado)
 (N.d.l.tr.)

al la interesoj de la enmigrantoj; estas ja evidente, ke plej efika rimedo por igi la enmigrantan laboristaron facile transportebla, estas tenadi ĝin en provizoraj loĝ-kondiĉoj.

La intervenado de la publika potenco en la lastaj jaroj apenaŭ povis kredigi al malbone informita publiko (voĉdonantaro ?), ke oni iomete interesiĝas pri la migrantoj. Por ekzemplo, FAS financis la kreadon de 150 000 litoj por fraŭloj, sed tio staras malproksime de la 800000 necesaj ! Same, inter 1964 kaj 1974 estas konstruitaj 20 000 loĝejoj por proksimume... 500 000 familioj ! Kaj oni scias, ke la amplekso de la konstruataj HLM daŭre malpliĝas, inverse al tiu de la enmigrantaj familioj.

Ĝis nova decido (kion preskribas pri tio la 7a plano?), 650 000 fraŭloj devas amasiĝi en domaĉoj, en migrul-gastejoj, ĉe dormo-vendistoj, po 12 ĝis 15 en ĉiu ĉambro; 480 000 familioj, krom tiuj malmultaj, kiuj disponas decajn loĝejojn, devas iri aglutiniĝi en "bidonvilles", en kvartaloj renovigotaj kaj -ataj (dum la malkonstru-kaj rekonstru-laboro), laŭ bonvolo de la konstruantoj... Malsanaj gettoj por aroj da sklavoj, jen estas la elekto de la publika potenco por la laborforto, kiu tenadas ekvilibra la ekonomian kreskadon de la lando - ĝis tiu laborforto estos resendita al sia hejmolando, aŭ ĝis ĝi ne plu elportos tiajn vivkondiĉojn.

Kial Nederlando, kies denseco de loĝantaro estas kvaroble tiu de Francio, ne havas samajn problemojn pri siaj enmigrantoj, proporcie tiel multaj (7 %) ?

En 1972, la cirkuleroj de Marcellin kaj Fontanet (Vd. I, 5, p.11) trudas la enmigrantojn prezenti ateston pri loĝado por ricevi laborkarton kaj restad-permeson. Tio estas ne por kontraŭbatali la mankon je loĝejoj aŭ la malsanecon de la ekzistantaj, sed ja por meti la enmigrantan laboristaron je la servo al la mastraro.

Oni povas eĉ opinii, tute verŝajne, ke tiu dispozicio estas decidita por favori la kaŝan enmigradon, tial, ke tiu ĉi estas multe pli profitiga al la labordonantoj ol la lica enmigrado : la mastroj ja povas dungi kaj maldungi, laŭvole, senprobleme, pagi plej malaltajn salajrojn al "neliculoj", kiuj ne estas postulemaj, kaj pri kiuj oni ŝparas la socialajn kotizojn, ĉar ili ne estas deklaritaj.

Lasi al enmigrantoj nur la alternativon, ĉu restadi en

malhumanaĵoj, ĉu foriri, ŝajne estas rimedo por malkuraĝigi la enmigradon. Neniel : tiuj diskriminaciaj rimedoj estas adoptitaj nur por ligi al si sklavaron brutigitan per sendormaj noktoj, per ellacigaj transportadoj, per malhumanaĵoj hortabeloj kaj laborkadencoj.

3 c/ La sanstato de la migrantoj.

La "sifilisa arabo" ne ekzistas *. La solaj ĝermoj portataj de Marokanoj, Alĝerianoj kaj Tunizianoj venantaj en Francion estas tiuj, malofte infektantaj la okcidentanojn, de akuta amebozo kaj paludismo. Male, la migranto, de kiu ajn deveno, facile infektiĝas per la ĝermoj devastigantaj en la malsanaj loĝejoj : 39 % el la ftiziuloj sur la franca teritorio estas fremduloj, kiuj ricevis la malsanon en Francio.

Aliflanke, granda nombro el la migrantoj suferas pro stomakaj aŭ duodenaj ulceroj, malsanoj bone konataj pri sia psika origino, malsanoj "de adaptiĝo". Imprese granda estas la nombro de malsanoj kaŭzitaj de malbonaj vivkondiĉoj, precipe de mensaj malsanoj. Krome, la proporcio de infana mortado estas duobla de la franca meznumero.

Pli supre ni pritraktis la labor-akcidentojn, kies viktimoj estas enmigrantaj laboristoj. Malsanaj kaj akcidentitaj migrantoj okupas 22 % el la hospitalaj litoj, iliaj infanoj ĝis 40 % en la pariza regiono. En 1968, en psikiatria hospitalo, el 100 fremdaj infanoj, 40 venis de "meblitaj hoteloj", 20 de "bidonvilles", 20 de transitloĝejoj kaj 15 de diversaj loĝejoj, ĉiuj malsanecaj.

Estus neutile komenti tiujn ciferojn, se ne pruvus multaj atestoj, ke la atakoj kontraŭ migrantoj koncernas precipe "tion, kion ili kostas al Francio". Iu kuracisto - profesoro, elektita prezidanto de la Medicina Akademio, indignas : "Kiel ni povas konsenti, ke niaj landlimoj restas traireblaj al tiu tuta afrikana laboristaro, jam infektita de tuberkulozo, kiu venas plenkstopi niajn ftizologiajn fakojn ?" . Li kredeble ignoras, ke la afrikaj negroj venas de varmaj landoj, trairas la landlimon kun medicina san-atesto, kaj ricevas tuberkulozon ĉi tie, en la

* Tiu aserto ŝajnas iel optimisma. Necesus havi statistikojn pri sifiliso en Nordafriko. Sed certe, ne ĉiuj araboj estas sifilisaj, kiel ofte asertas rasista propagando.

domaĉoj, kiujn ni grandanime ofertas al ili en nia malvarma lando.

Tiuj mem, kiuj, neglektante ĉian honestan pristudon, akuzas la migrantojn, ke ili "venas manĝi nian panon", vole ignoras, ke ja en niaj laborejoj ili rompas al si la membrojn; ke en niaj domaĉoj ili ricevas tuberkulozon; ke de francaj prostituitinoj ili ricevas sifilison; ke pro nenombreblaj turmentoj en la ĉiutaga vivo ili havas gastro-duodenajn ulcerojn; ke pro la malfacilaĵoj elportataj de siaj gepatroj iliaj infanoj mortas duoble pli ol niaj. Ili nescias, aŭ vole ignoras, ke tiuj junaj viroj kaj virinoj apenaŭ eliĝintaj el adoleskeco, tiuj infanoj, tiuj 900 000 malpli-ol-deksesjaraj tre rapide ricevas tiujn malsanojn, kiujn ili ne havis antaŭ sia alveno.

Afrika nigrulo ricevos tuberkulozon inter la 6a kaj la 18a monato de sia restado, viktimo de la malvarmo, de la penigaj laborkondiĉoj, de nigrenaj kaj ceteraj mankoj; nigrulo ricevas tuberkulozon 20- aŭ 30-oble pli ol franco. Alĝerianoj, kiuj okupas 44,9 % el la malbonaj loĝejoj en Francio, kaj kiuj venigas sian familion, vidos siajn infanojn fariĝi rakitismaj en tre forta proporcio, kaj ricevos mem, se ili restos sufiĉe longatempе, stomakajn aŭ intestajn ulcerojn.

"M. ne pagas luprezon por la du ĉambroj, kiujn li okupas kune kun sia edzino kaj siaj sep infanoj (la tria ĉambro ne havas plu tegmenton). Li neniam vidis sian ludonanton. Sed la luprezo de deca apartamento por sia tuta familio en HLM * estus malpli peza ol liaj kuracistaj elspezoj..."

Post tiu skizo de la vivkondiĉoj de la enmigrintaj laboristoj, oni ne povas ne kompari kun la laboristaj vivkondiĉoj en la fino de la antaŭa jarcento : la sorto de la migrantoj en 1975 ne estas pli enviinda ol tiu de la laboristoj anglaj aŭ francaj en 1875.

3 d/ Lerneja vizitado de migrul-infanoj.

Ni nur tuŝetos tiun problemon, por priatenti pli speciale la infanojn de magreba origino en la lasta parto de

* Malgraŭ la nomo : Loĝejoj je moderaj luprezoj, la luprezoj en HLM estas relative altaj por la buĝeto de laborista familio.
(N.d.l.tr.)

tiu ĉi ekspono.

Nun estas en Francio pli ol 900 000 infanoj de migrintoj en lerneja aĝo. Fakte nur 600 000 vizitadas la lernejojn.

"El 100 lernejon vizitantaj infanoj, 60 suferas lingvaĝo-afekciojn, 20 scias nek legi nek skribi; la 20 ceteraj ne povas pretendi pri integriĝo sen malfacilo en la francan vivon"; tia estas la bilanco starigita en oktobro 1974 de la ŝtatestrekariejo pri enmigrado.

La lernantigado de la idoj de enmigrintoj ja prezentas certan nombron da problemoj. En siaj rasistaj kampanjoj la semajna gazeto "Minute" akre akuzas la "nivelon" de la enmigrintoj, aparte tiun de iliaj infanoj; laŭ Minute, la migrulaj infanoj malaltigas la nivelon de la francaj lernejklasoj; Minute plie pretendas (laŭ kiuj studoj?) ke la francaj infanoj de la 20a arondismento * parolas pli arabe ol france... Oni emus ĝoji pro tio, ĉar al dulingvaj infanoj estas promesita pli brila estonteco ol al multaj !

La ekstremdekstra semajngazeto ignoras, ke la infanoj de migrintoj ofte estas pli diligentaj lernantoj ol la enlandaj; multaj atestoj montras, ke, trapasinte la lingvan baron, ili atingas nivelon kompareblan kun tiu de la pli-multo el la francaj infanoj.

En unu lernejo de Fontenay-sous-Bois, en 1972, estis kreita, kiel en kelkaj aliaj francaj komunumoj, speciala lernejo por adaptado de migrintoj (ĉi tie portugaloj), en kiu la instruado estis donita en ambaŭ lingvoj. Tre konkretaj rezultoj estis rapide observitaj : en tiuj kondiĉoj la portugaloj asimilas la francan lingvon pli rapide ol kutime ĉe klasikaj lernejoj; en aliaj lernotemoj, instruitaj kune en ambaŭ lingvoj, ili staras ĉe la sama nivelo kiel iliaj francaj kunlernantoj.

Fakte, la plimulto el la malfaciloj spertataj de migrant-infanoj venas de du ĉefaj fontoj.

El tiuj ambaŭ fontoj la pli grava estas la lingva baro. Ĝi jam ekzistas por la gepatroj kiel grava faktoro de neadaptiĝo, kaj troviĝas pligravigita per la hontosento kaŭzata de sci-manko ĉe la infanoj. Malgraŭ forta proporcio da enmigrintoj en iuj klasoj (70 % en Nanterre apud Parizo), la metodoj restas neŝanĝitaj; tial ne estas mirige konstati,

* 20a arondismento de Parizo, laborista kvartalo
Ménilmontant. (N.d.l.tr.)

ke en tiaj kondiĉoj la ne-adaptiĝo al lernejo ne nur ne resorbiĝas, kiel ĝi povus per taŭga instruado, sed male kreskadas en la vicoj de la migrintaj infanoj. Adapti la "kazon" al la ekzistantaj strukturoj, tia ŝajne estas la bronza regulo de la administracio. Male, Fernand D., kiu laboras en "supla" institucio, strebas adapti la strukturon kaj la instruantojn al la ne-adaptitaj infanoj, kiujn ili devas prizorgi.

La dua faktoro de malbona adaptiĝo al la lernejo, kiu trafas la infanojn de migrantoj, estas la "patologiiga* medio", en kiu ili estas ĉiutage mergitaj. Eĉ la familia strukturo estas mem difektita per la longdaŭraj forestoj de la laborantaj gepatroj kaj per la vivkondiĉoj, mal-multe favoraj al elflorado, spertataj de la migrantoj.

La etoso, en kiu evoluas la infano, estas almenaŭ tiel grava kiel la lingva baro. En senstreĉa kaj ekvilibra etoso la infano havas ĉiajn ŝancojn por rapide solvi la problemon pri lingvo kaj komunikado, kaj sekve atingi la nivelon de siaj kunlernantoj laŭ instruiteco kaj kulturo. Tia ne estas ofte la kazo en la vivo de enmigrintaj laboristoj. Aldonante al tio la multajn kaj diversajn fenomenojn de forĵeto, la medio ĉirkaŭanta la migrulan infanon ne helpas solvi la problemojn pri adaptiĝo de la parioj de la nacia edukado.

Unu ekzemplo, kiu ripetiĝas en multaj kvartaloj kun forta denseco de enmigrinta loĝantaro, estas tiu de kvartala lernejo, el kiu dizertis la francoj; en ĝi la infanoj, 80 ĝis 90 % fremdaj, ricevas plej klasikan instruadon, flegme prezentatan de francaj instruistoj. Tio estas pripensiga por ĉiuj, kiuj kredas pri la reala aŭtenteco de elvokiteco en nacia edukado.

Tiam prezentiĝas demando pri la funkcio mem de la lernejo : ĉu ĝi devas daŭre trudadi kulturmetodon, kiu ne nur misatentas tiun de siaj "klientoj", sed ankaŭ eliminis ĉiun alian formon de kulturo kaj lingvo ?

* mensmalsaniga

IV - Elradikigo kaj rasismo.

1. Elradikigo en la akceptanta lando.

Teorie la migradoj internaj kaj eksteraj povus konduki la migrantojn kaj la akceptantan loĝantaron al interŝanĝoj, interrenkontoj de siaj kulturoj. Male oni konstatas, ke en la plimultaj okazoj tiuj interŝanĝoj kaj interrenkontoj ne fariĝas. Ĉiu migranto, en iu aŭ alia tempo, estas alfrontita al tiu "terura soleco-sento" naskita de izoliteco socia kaj kultura, kiu lin kondukas al sopiro kaj strebado al kultura kaj etnia regrupiĝo. La migrantoj estas elradikigitoj.

La migraj movadoj translokigas kamparajn homamasojn al urbaj centroj. Devige estas konstati, ke en la kazo de eksteraj migradoj tiuj abruptaj ŝanĝoj de socia medio estas akompanataj de ŝanĝoj je lingvo, ofte je moroj, kutimoj, tradicioj, iafoje religio. La modifoj de la vivkondiĉoj estas do ofte sentataj de la migranto kiel unua agreso far la medio, kiu estas supozate lin akceptanta. La enmigranta laboristo, kiu elŝipiĝas aŭ elaviĝas en Marsejlo aŭ Orly, kiu eltrajniĝas en Tuluzo, Liono aŭ Parizo, alfrontas la malamikecon de granda urbego, tiel malsimila de "ĝebejloj"*, de duaroj Nordafrikaj kaj de Kalabriaj vilaĝoj, de turkaj dezertoj...

La kampara medio, de kiu venas la migranto, ofte malpermesas al li rapidan adaptiĝon al la urba vivo de la okcidenta industria mondo.

Ni konsideru la kazon de migrantoj el Nordafriko; inter la migrantoj en Francion, ili estas tiuj, kiuj spertas plej multe da malfacilaĵoj por elporti la "ŝokon" de la okcidenta kulturo. En nombro senĉese kreskanta, kiu atingis 1 264 000 en januaro 1974, ili konsistigas preskaŭ trionon el la migranta grekkapitalo. Al la malfaciloj de adaptiĝo sekve de ilia limigita sperto pri la urba medio (la venantoj de grandaj magrebaj urbocentroj estas jam antaŭe transplantitaj) aldoniĝas tiuj, kiuj rezultas de tre malsimilaj vivmodoj kaj de religio, kies influo estas tre grava en la socioj de la araba mondo.

La kultura provizo, kiun kunportas tiuj migrantoj, ne povus malhavi la ĉiutagan alporton kaj subtenon de la tuta

* ĝebel : araba nomo por montaro.

vilaga kaj religia komunumo, kiu ĉirkaŭas ĉiun muzulmanon en la origina lando.

Deŝirita de sia komunumo, transplantita en mondon, kiun li malfacile alproprigas al si, kaj kiu ofte estas al li malamika - tiom per sia funkciado mem, kiom per la konduto de siaj anoj - la magreba laboristo estas ofte emigata al disrompiĝo disde siaj kulturaj kaj religiaj tradicioj, malgraŭ la rilatoj, kiujn li penas konservadi kun siaj parencoj, najbaroj kaj amikoj restintaj en la lando.

Laŭ fontoj diversaj kaj malmulte oficialaj, oni povas ricevi proksimuman ideon pri la proporcio el la alĝerianoj konservantaj striktajn rilatojn kun sia familio, sia vilaĝo, siaj tradicioj :

- 90 % revenas al sia lando almenaŭ ĉiun duan jaron;
- 88 % sendas leterojn akurate, proksimume ĉiun semajnon;
- 87,5 % regule sendadas poŝtmandatojn;
- 74 % observas religiajn tradiciojn;
- 70 % respektas la ramadanon.

Kiel reago al la ĉiama agresado, kiu estas por ili la kultura ĉirkaŭmedio, multo el la migrantoj respondas per plistreĉigo de la kulturaj kaj etnaj ligaĵoj : ne malofte oni retrovas ilin grupiĝintaj laŭ origina vilaĝo. Kaj ofte ili retroviĝas, kiel ni jam vidis, laŭ etno en multopaj grupoj, specoj de gettoj.

En tiu kadro, kiu respegulas la originan, la kulturaj ligiloj estas multe pli rigidaj, kio pliakcentas la antaŭekzistantan diferencon disde la ĉirkaŭa medio. La patriarka karaktero de iuj rilatoj emfaziĝas rilate al la kreskanta liberalismo de la ĉirkaŭaĵo, la familiaj hierarkiaj rilatoj plihardiĝas, la religio akiras ritan gravecon, kiun ĝi antaŭe ne havis, la karakterizoj de socia sintendo plinetiĝas.

Tiel, en la plimultaj okazoj, estas la infanoj akompanintaj sian patron en Francion, kiuj plej suferas pro la elradikigo, kaj estas submetitaj al plej ekstremaj streĉoj. La rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj difektiĝas laŭgrade de la kreskanta distanco, kiu disigas la kulturon konservitan de la gepatroj disde tiu, kiun kunveturigas la socia ĉirkaŭmedio.

Tiel disŝiriĝas familioj, kies infanoj - evoluantaj inter mondo iafaje arkaika, tiu de iliaj gepatroj, kaj alia en konstanta aliiĝado, la okcidenta -, ne sukcesas ensorbi

en sin iun el ambaŭ kulturoj, ne kapablas superi unu aŭ la alian el la kontraŭstarantaj kulturoj, aŭ partopreni en ambaŭ kun sama intenseco.

Tiu esenca problemo de la vivo de migrantoj aparte tuŝadas la edukistojn el ĉiuj institucioj en rilato kun ili.

2. Elradikigo en la origina lando.

"Kiam ni estas revenintaj, ni volas reforiri;
Sed, apenaŭ foririnte, ni sonĝas pri reveno;
Ni foriras, revenas, kiel hirundiĝoj."

Tiu kanzono de Sliman Azel, fama inter la migrintoj, ĝuste ilustras kaj tradukas la dilemon, antaŭ kiu ili staras : senĉese distirataj inter profunda deziro trovi sian devenlandon kaj bezono perlabori sian vivon, bezono tiel profunda - ĉar vitala - kiel la deziro.

En Francio, la migrinto ricevis profundan transformadon, kaj ofte ne similas plu al tiu, kiun konis liaj parencoj kaj amikoj forlasitaj ĉe lia elmigro. Apenaŭ li komencas sin senti iom hejme en Francio, jen li intencas aŭ venigi sian familion, aŭ reforiri al la lando. Impregnite de okcidenta kulturo, li estas tiam nerekonata de sia alvenanta familio, aŭ fremda en la lando, en kiun li revenas. Pro la ricevita transformo, li iom post iom deligiĝas de sia origina medio kaj de la vivmaniero de siaj samlandanoj, tamen ne estante asimilita en la societo, kiu lin modifis. Por multaj la diferenco jam sentebliĝas ĉe la unua feri-periodo pasigata en la lando.

Ofte la malfacileco de reenigo en la originan medion estas eĉ pli granda, kiam la migrinto revenas, antaŭe kunveniginte sian familion : la ĉeesto de la infanoj, kiu ja plifaciligas la rilatojn kun la ĉirkaŭanta medio, naskas gravajn problemojn ĉe la reveno.

Plie, la reveno en la landon kolizias kun la forĵeto - konscia aŭ ne - de la homoj restintaj en la vilaĝo; la "rumioj"* pli malpli perfidis sian landon. La pliaĝaj, precipe, malbone akceptas la videblan evoluon de la migrintoj - kiu aparte evidentiĝas ĉe la infanoj : tiuj ĉi ne konservis la kulturajn tradiciojn de la lando, vivas kiel francoj, havas samajn bezonojn, samajn aspirojn, samajn morojn.

Do la migrinto estas penetrinta en senelirejon. Por eltiri sin el ĝi, li spertos plej grandan penon : viktimo de

* rumio (romano), kromnomo por "kristano", etendiĝas al migrinto en kristana lando.

duobla elradikigo, li jam nenie estas hejme, kaj al li estas malfacile elekti la landon, en kiu li finos sian vivon. Oni sciu, por ekzemplo, ke ĉiujare 30 000 fremduloj akiras la francan naciecon.

3. La infanoj.

Avidaj ĉion lerni, kaj tre rapide, ili baldaŭ scipovas paroli, legi kaj skribi franclingve. Ili fariĝas privilegiaj perantoj inter siaj gepatroj kaj la ĉirkaŭularo, la sociaj kaj oficialaj aparatoj. Mergitaj en okcidenta kulturo, ili, pli malpli frue, evitas esti vidataj de siaj amikoj kaj kamaradoj en kompanio de siaj gepatroj, precipe se ĉi tiuj havas forte stampitan landan aŭ tradician aspekton. Pli-malpli konsciaj pri siaj diferencoj kun siaj najbaroj, siaj lernejoj aŭ laborejoj kamaradoj, ili estas ofte agresemaj, ĉiam en memdefenda sinteno, malfidemaj - ĉar instruitaj per antaŭaj spertoj.

Pli sentemaj ol la gepatroj, kies magrebanan "fatalismon" ili ne havas, ili estas multe pli frapitaj per la rasa kaj socia diskriminacio, de kiu ili estas viktimoj.

Pli-malpli konscie, ili iom post iom forĵetas ĉion, kio memorigas ilin pri ilia origino - do unuavice siajn gepatrojn - levante sin kontraŭ la patran aŭtoritaton, kiun ili retrovas kaj kontestas en la socia kaj familia hierarkio de la vilaĝo aŭ de la kvartalo, de kiu ili venas. Premkaptite inter ambaŭ fajroj de sia origina kulturo kaj de la franca, dividante kune okcidentan kulturon - malmulte aŭ malbone asimilitan - kaj kulturan heredaĵon, kiun ili ne internigas en sin, ili estas fakte submetitaj al disŝiraj streĉoj inter ambaŭ medioj, kio ofte finplenumas ilian erarvojigon. Ili vere estas "de nenie", dum iliaj gepatroj ĝuas almenaŭ la avantaĝon plene dividi kulturon, kiu banadis ilian infanecon.

4. La gepatroj, kiuj adaptiĝas.

Certa nombro el migrintoj, en proporcio malfacile evaluebla, sukcesas adapti sin al la franca kulturo, kaj iom post iom plisupligas siajn tradiciajn ligilojn kun sia landa kulturo, ĝis fine ili el ĝi liberiĝas.

Tiuj ĉi spertas aliajn malfacilojn ol tiuj, kiuj strebas konservi ligojn kun sia origina lando. Ja por ilia generacio, ili suferos la samajn forĵet-fenomenojn, kiel

iliaj samlandanoj; al ili estos pli malfacile reiri al sia lando; iliaj infanoj havos nenian ligitecon kun la devenlando, kaj tial nenian eblecon de identiĝado al iu kultura grupo. Mallonge, la malfaciloj, al kiuj troviĝos alfrontitaj la migrintoj el tiu tipo, estas pli gravaj en la okazo, se la infanoj volas retrovi sian devenlandon; sed ili estas malpli gravaj por la adaptiĝado en franca, okcidenta medio.

5. Rasismo.

Ĉie en Francio, precipe en la regionoj kun forta dens-eco de migrintoj, sin manifestas streĉoj konkretigataj per multaj agresoj kaj kvazaŭ-ĉiutagaj perfort-agoj kontraŭ fremdaj landanoj. En ĉiuj regionoj de Francio eksplodas oftaj incidentoj, kies raportoj plenigas la kolumnojn de la gazetoj kaj la "mass-media"*.

"X, taksi-ŝoforo, estas agresita de arabo..." "En la regiono de G., grupo da junuloj forpelis el popolbalo bandon da nordafrikanoj..." "Multaj agresadoj en "bidonville" de nordpariza antaŭurbo"... kiu ne vidis tiajn titolojn en ĵurnaloj, aŭ ilin aŭdis en radio...?"

Ne malofte la informo reprenas oficiale la rasismajn manifestadojn.

Iu deputito-urbestro de granda urbo sudorienta, nun ŝtatestretario, publikigis en regiona ĉiutaga ĵurnalo jenajn liniojn, prave maltrankviligajn por fremduloj: "la enmigrado: ne trapasenda sojlo... Francio ne estu la plej granda hospitalo de la tria-mondo nek ĝia plej granda lernejo."

Ĉiu socia fakulo scias, ke la ĉiutaga formulo "sojlo de tolero" sidas sur neniu scienca bazo; same, ne necesas longe preparoli la neekziston de ĉia racia fundamento por rasismo, kaj la produktivan, ne-parazitecan aspekton de la migranto.

Ŝajnus tamen necese, ke estu donita nacia informado pri tiuj temoj: Ĉar granda nombro da personoj tute aŭ parte nescias pri tiuj sociaj kaj ekonomiaj realaĵoj. Same, estas multfoje pruvite, ke en similaj vivkondiĉoj, la magrebanoj - tiel ofte kulpigitaj en seksmoraj aferoj, pri kiuj frandas certa gazetaro - kondukatas pli konforme al tradiciaj valoroj regantaj nian okcidentan socion, ol francoj met-

* mass-media : radio, televido ks.

itaj en similajn kondiĉojn.

Estas do prudente atribui parton el la kaŭzoj de rasismo al la kolektiva heredaĵo kultura kaj eduka. Tiel estus eble redukti la efikojn de rasismo kaj la diskriminacion, kies viktimoj estas la migrantaj laboristoj - jam longe, per, ekzemple, kampanjo en la lernejoj.

Notinde estas, preterpase, ke la rasismo estas pli unusenca ol reciproka. Ni ja povis konstati multfoje - aŭ en niaj kontaktoj kun migrintoj en Francio, aŭ kun indiĝenoj en fremdaj landoj - en kia reala estimo estas rigardata ĉiu franca civitano. Ne eblas atribui tiun kvazaŭ unuaniman senton al la sankta leĝo de gastamo, fundamenta en la sudmediteraneaj landoj. Ĉu ni kredu, ke la rasismaj manifestadoj estas propraĵo de la francoj? Certe ne; sed oni devus moderigi la komparon per ciferaj donitaĵoj.

Povus ŝajni, ke la franca registaro ne plenumas la rolon, kiun oni devus atendi en nacio, en kiu la fremduloj havas ĉefan gravecon. Male, anstataŭ moderigi la ksenofoban kaj rasistan klimaton, ŝi strebadas ĝin ŝirmi, eble eĉ ĝin estigi. Ĉu cele teni preta evakuan pordon por la tempo - kiu venos - kiam la importita laborforto ne estos plu^{ne} malhavebla?

Dua parto.

Kontrol-Edukado kaj infanoj de migrantoj.

I - Konstato.

1. La magreba infano en KE.

Ni povas raporti nur pri malvasta kaj relative freŝdata spertado, sed precizaĵoj estas al ni donitaj kaj konfirmitaj de multaj pliaĝaj edukistoj dum diversaj debatoj kaj interŝanĝoj.

La magreba infano, kiel ni vidos, posedas propran civilizon kaj kulturon : komuna heredaĵo de tuta popolo, de tuta mondo.

En Francio, liaj gepatroj kaj li mem estas "devitaligitaj" je tiu civiliza kaj kultura heredaĵo; ili trude aligās al la okcidenta civilizacio kaj al la kondutreguloj regantaj en la akcepta lando; ili estas ankaŭ izolitaj en sia adaptiĝado, kune per la necesoj de sia laboro kaj per la forĵeto far la socia ĉirkaŭaĵo.

La politiko de Francio kontraŭ la migrantoj ŝajne procedas je duobla vojirado :

- unuflanke, ĉio ŝajnas destinita por tenadi la migrantajn laboristojn kaj iliajn familiojn ekster ĉia franca vivo politika kaj socia, por izoli ilin disde la evoluado de la okcidenta mondo, cele ekspluati ilian laborpotencialon en plej profitiga maniero.
- aliflanke, en la institucioj, nenio estas konceptita, por ke la migrantoj konservu sian specifan sintenadon, sian kulturan heredaĵon kaj siajn vivtradiciojn; tiu ĉi lasta tipo de respondo al la ĉeesto de migrantoj en Francio tendencas konformigi ilin al la normoj de la

okcidenta kaj franca civilizo.

Tiuj du ĉefaj streĉoj (al kiuj aldoniĝas la adaptiĝ-malfaciloj de ili naskataj), ne nepre kontraŭdiraj aŭ diverĝantaj, pligravigas la malekvilibron kaŭzitan de la elradikigo. La infanoj, aparte, estas tiuj, kiuj elportas la pli grandan pezon de la penado por izoligo kaj konformigo al la okcidentaj kultur-skemoj; kaj inter tiuj infanoj, speciale tiuj de magreba deveno.

Do ne estas mirige trovi junajn alĝerianojn, tunizianojn kaj marokanojn, perturbitajn per la vivo al ili trudata, en la centroj de KE.

Fronte al fremdaj infanoj - ni parolas pli aparte pri magrebaj - la oficoj de KE ne ŝajnas praktikadi specialajn teknikojn por "redukado". Same en la nacia edukado, krom kelkaj esceptoj, kiel ni jam okaze rimarkis (III, 3 d, p.29,30).

La edukistoj kaj ĉiuj oficistoj en KE praktikadas la saman pedagogion por ĉiuj "klientoj", kiujn ili ricevas kiel ŝarĝon : francoj kaj fremduloj ricevas la samajn eduk-preceptojn, estas "lokitaj sub la sama ŝildo". Tio estas kredeble pro la celo, laŭdinda, ne pli izoli la infanojn per plia diskriminacio.

Laŭ ni, la ĉefa difekto de tiu pedagogia praktiko estas, ke ĝi ne distingas inter unu popolo kutimigita al certa maniero de vivo kaj alia, al kiu la civilizo kaj kulturo instruataj de la "perceptistoj" de KE estas radikale diferencaj de tiuj de iliaj gepatroj kaj de ilia origina medio.

Verŝajne tiu praktiko, neniel solvante la adaptiĝ-problemojn de la nordafrikaj infanoj, pli certe tendencus akriigi la internajn streĉojn en la individuoj, sur kiuj ĝi aplikiĝas, samkiel la streĉojn inter la koncernataj infanoj kaj iliaj gepatroj.

2. Rolo de la edukisto.

En la nuna praktiko, ŝajnas, ke la edukisto, kiel ĉiuj socialaj faklaboristoj, ne disponas alian eblon ol adapti la junan magrebanon al la ekzistantaj strukturoj, integri lin en la francan vivmodon, en la soci-kulturan sintenadon de la okcidenta mondo, kontraŭe al la propra heredaĵo de la infano, eliminante ĉian embrion de civilizo kaj kulturo fremda al la kulturo portata de la ĉirkaŭa strukturo.

II - Edukaj praktikoj por magrebaj infanoj.

Male al tio, kio estas nun praktikata en KE, oni povas esti tentata proponi aron da praktikoj, kiuj estus orientitaj al arabigado de la pedagogio turnita al magrebanoj.

Tiuj du orientadoj, dise konsiderate, ŝajnas malkompletaj; tiom unu kiom la alia flankelasas certajn faktorojn.

La unua solvo, nun praktikata en KE, neglektas ĉiujn specifajn donitaĵojn, kiujn ni ĵus prezentis.

Sed ni ne povas akcepti unike la duan, pedagogion larĝe arabigitan, ĉar necesas kunkalkuli la forĵet-fenomenojn naskatajn de la kolizio inter kulturoj, civilizoj. Plie, se tiu dua solvo povus aplikigi en la strukturoj, aparte protektataj, de KE, estas verŝajne, ke tuj ĉe la eliro el tiu kadro, oni retrovus, pligravigitaj, la problemojn, kiuj kondukis tiujn infanojn en niajn oficojn.

Ĉar ĉiu el tiuj du proponoj havas avantaĝojn, ni estas kondukitaj ekiri de ambaŭ por provi difini, kun plej granda zorgo pri efikeco por la infanoj je nia ŝarĝo, proponon, en kiu estas kunkalkulitaj kune la realaĵoj de la ĉiutaga vivo kaj la apartaj formoj de ne-adaptiĝo, kies viktimoj ili estas.

Mi ne pretendas ĉi tie doni miraklan solvon al la problemoj renkontataj de migrantoj kaj de oficistoj de la KE; sed ni havas la senton, ke solvoj devas esti studotaj, proponoj prezentotaj, kun la celo rerajtigi la magrebajn ne-plenaĝulojn, kaj koncerne la problemon de ĉiuj neplenaĝaj fremduloj, kies ŝarĝon ni havas sur ni.

Unuflanke, ŝajnas necese meti akcenton sur la kulturon kaj la civilizojn specifajn de magrebanoj; aliflanke, necesas respondi al la petado - ĉu esprimata, ĉu latentata - de tiuj "klientoj" koncerne donitaĵojn, kiuj ebligus adaptiĝon, almenaŭ relativan, al la strukturoj de Francio; fine, estas necese kunkalkuli ankaŭ la materiajn rimedojn kaj la kapablecon de la edukistoj okupiĝantaj pri tiu migrinta populacio.

Ni jam diris, ke iu ekstrema solvo ne povus esti kontentiga. Tamen, ĉiu el ambaŭ solvoj elvokitaj en la komenco havas almenaŭ la avantaĝon, ke ĝi proponus al la juna magrebanon identiĝon al unu el ambaŭ civilizoj, al kiuj li apartenas almenaŭ parte.

Do, verŝajne kunutiligado de ambaŭ solvoj estus plej

bona maniero por kaŭzi minimuman malbonon al la koncernataj neplenaĝuloj. Necesus disdoni, en la formado de la personeco de la "klientoj", kune la elementojn necesajn al la alproprigo de ilia origina civilizo, kaj tiujn, nemalhaveblajn, por ilia evoluado en la strukturoj, en kiuj ili devos vivi en Francio.

Tiel ili akirus la rimedojn - sukcesinte superi unu kaj aliajn kulturojn - por sin difini rilate al ili ambaŭ, laŭ la donitaĵoj, kiel eble plej objektivaj, disdonitaj de socialaj laboristoj mem edukitaj por tiuj celoj.

* *
*

Ŝajnas ke, se la solvo ĉi-supre proponita ne estas ĝis nun efektivigita en KE, tio povas esti aŭ pro manko je konsciigo, aŭ pro manko je rimedoj.

Ŝajnas ne malpli evidente, ke la kultura aŭ civiliza "reekvilibrado" lamas pro manko je elementoj alportataj al la infanoj kaj al ili adaptitaj.

Ja la alkulturado en unu aŭ la alia el ambaŭ civiliz-sistemoj, okcidenta aŭ araba, ne estas sufiĉa, por ke la infano retrovu stabilan fundamenton, samkiel la duobla alkulturado antaŭvidita en la supra propono ne povus, sola, esti sufiĉa.

Fakte, elfonte de la elementoj jam konsideritaj en la unua parto de tiu ĉi verketo, gravas liberigi la magrebanon - kaj ĉiun alian migranton - el la bildo, kiu estas ilia en la franca socio : nome tiu de "raso", de "subhomoj", sklavo de la grandegaj okcidentanoj. Gravus, laŭ ni, ke la magreba infano jam ne perceptu signojn de forĵeto kiel justan kondamnon de lia etno, de lia "raso", de lia origina mondo. Gravus, ke la juna nordafrikano ne plu hontu aŭdante, ke oni nomas lin "bicot", "raton" aŭ "melon". (malŝataj kromnomoj donataj al araboj).

Sed gravus ankaŭ, ke li ne havu plu la senton esti "rumio" por siagentanoj; ke li ne havu plu la konvinkon - kiel ofte ankoraŭ nun - ke li portas en si, nekuraceble, tiun "difekton" : esti tro profunde markita de la okcidenta civilizo. Gravus, fine, ke la enmigranta infano komprenu la rolon ludatan de lia similulo restinta en la lando, en la mikro-socioj, kiuj konsistigas lian originan medion.

Tiel la reala celo de la edukisto - fakte de ĉiu sociala laboristo - , kiu havas la ŝargon de edukado (en

normalaj lernejoj) aŭ de "redukado" (en KE-lernejoj) de magrebaj infanoj, estas agi tiamaniere, ke tiuj ĉi retrovu en si mem kaj en sia medio rasan dignon, fierecon pri sia origino.

Tiam sendube, se tiun orientadon akompanus kampanjo, inter francoj, por rajtigado de la enmigrintoj, povus esti solvita granda nombro el la konfliktoj, kiuj oponigas la migrantojn al la okcidentanoj, aparte al francoj.

Verŝajne restus ia nombro el la kunekzistaj malfaciloj, a fortiori se la migrantoj kapablos demunti la realajn mekanismojn de la migrad-politiko; sed povus esti solvita almenaŭ la pli granda parto el la individuaj konfliktoj, internaj kaj familiaj, kies ekzisto evidentiĝas per la ĉesto de infanoj en redukaj institucioj.

Aldoni al la nunaj edukaj praktikoj de KE pedagogion kunkalkulantan la araban kulturon kaj civilizojn, tio povas ŝajni tro ambicia kaj nerealisma.

Tamen, se oni sin klinas super certan nombron da eksperimentoj jam provitaj interne de la nacia edukado, kaj se oni ekzamenas certajn rimedojn uzeblajn, oni nepre estas interesata pro ilia relativa simpleco.

III - Rimedoj.

Grave estas, ke oni donu al si nombron da rimedoj, kiujn eble povus difini studado far fakuloj : sociologoj, etnologoj, psikologoj (kiujn ni ne pretendas anstataŭi).

Du elementoj ŝajnas al ni esencaj por alproksimiĝo al la solvo :

- starigo de strukturoj adaptitaj al la formado de kompetentaj personoj rilate la kulturan alporton necesan al la fremdulo.
- vokado al kunhelpo de fremdaj edukistoj.

1. Inicido en arab-islama kulturo kaj civilizo.

Ja certe, seminarioj ne estas novaĵo en la lernejoj por socialaj laboristoj, ankaŭ ne, aparte, la seminarioj pri migrantoj; plie, verŝajne la formantoj kaj animantoj de KE-lernejoj ne neglektas la gravecon de la migra fenomeno kaj ĝian efikon al la funkciado de edukaj strukturoj.

Sed la rimedoj, kiujn ili havigas al si kaj dividas kun

la formataj edukistoj por pli profunda alproksimiĝado al la problemo, estas sendube nesufiĉaj por eventuala efektivigo de la difinita celo, nepre izolitaj, koncentritaj en relative mallonga daŭro, kaj nur akcesoraj en aro da tre diversaj formad-elementoj.

En la lastaj monatoj, dezirante pli profunde alproksimiĝi al la problemo, Ŝajnis al ni oportune partoprenigi kiel eble plej multajn formiĝantajn kolegojn al fasko da rimedoj starigitaj en la lernejo de Savigny-sur-Oise, cele informi pri la araba kulturo kaj civilizo, kaj proponi eblon akiri kelkajn bazajn lingvo-nociojn, por ebligi postan studadon de la dialektoj parolataj en Magrebo.

Tiel funkciadis, de oktobro 1975 al januaro 1976, du grupoj da edukist-lernantoj, kiuj sekvis, po du fojojn ĉiusemajne, kursojn pri dialekta arablingvo. En la sama orientado, ĉiun lundan posttagmezon, estis organizitaj debatoj ĉirkaŭ temoj propraj al la araba mondo, kovrantaj civilizacion, historion, kulturon kaj problemojn politikajn, sociajn kaj ekonomiajn de tiu araba mondo.

La lernantoj kaj oficistoj partoprenintaj en tiuj kursoj kaj debatoj povis komenci akiri la bazojn necesajn por la eduka alproksimiĝado, kiun ili planas adopti en siaj rilatoj kun magrebaj neplenkreskuloj.

Tamen estas certe, ke alporto el ekstero estas necesa.

2. Kunhelpo de fremdaj edukistoj.

Ŝajnus interese profiti el la spertoj realigitaj en aliaj laborsektoroj, en kiuj la okupado, en edukaj strukturoj, de socialaj laboristoj samnaciaj kiel la fremdaj neplenkreskuloj, estis en multaj okazoj prosperinta rilate al celoj antaŭe difinitaj de la instigantoj kaj efektivantoj de tiuj eksperimentoj.

Miascie, tiu speco de eksperimentoj estas malofta en la oficoj de KE. Sendube bedaŭrinde. Tiom pli, ke simila propono vekis eĥon ĉe la alĝeriaj aparatoj pri juneco kaj sporto (Vd. raporton pri vojaĝo en Alĝerio de grupo da edukist-lernantoj el la Rodana servo de KE.)

Sen preteratenti la diferencojn ekzistantajn inter la kutimoj kaj politikaj elektoj en la tri Magreblandoj, estus pervalore kunigi miksaĵajn skipojn de edukistoj el pluraj nacioj, ambaŭflanke sentemigitaj al la lingvo kaj civilizo de ĉiu el ili. Ili povus alporti valorajn ele-

mentojn de priserĉado kaj realigado por la ekprenado kiel ŝarĝon de la magrebaj neplenaĝaj deliktuloj en Francio.

Parizo, januaro 1976

Postskribo de la tradukinto.

Por ni praktikantoj de esperanto kaj strebantoj al sennacieca kulturo, nature naskiĝas en la cerbo aliaj ideoj, almenaŭ en teorio kaj por estonta tempo. Tiujn ideojn ni ne volas malkonfesi nek neglekti. Ni ne timas kultivadi utopion: ni ja scias, ke utopio antaŭ-figuras estontan realon; ĝi estas la grajno, kiu promesas rikolton. Ni semas la grajnon, "pri l'tempoj estontaj pensante". Sed, atendante, la homoj devas unue vivi, hic et nunc*.

La aŭtoro mem baraktadas meze de problemoj tute aktualaj, kiuj urĝe postulas senprokrastajn solvojn. Li estas alfrontata al krudaj faktoj, en difinitaj nunaj cirkonstancoj, kiujn li devas rigardi tute objektivaj, realisme, pragmatisme. Liaj "klientoj" estas magrebaj kaj alilandaj infanoj, nemulte instruitaj; ili vivas en medio, en kiu la lingvo internacia, nesufiĉe disvastigita en la nuna mondo, tre malmulte povus helpi al ili. En tiuj kondiĉoj, nia teoria solvo pri la problemoj de lingva baro kaj de kulturoj inter si fremdaj, ankoraŭ ne estas valida - ĝi ne estas matura.

En tiu perspektivo, la respondoj de la aŭtoro al la starantaj demandoj ŝajnas al ni pripensindaj. Ni opinias, ke el tiu verketo povas eltiriĝi interesaj temoj por studoj kaj debatoj en rondo de nia SAT-junularo.

* Ĉi tie kaj nun.

Vortoj ne troveblaj en PV kun suplemento, aŭ uzitaj en senco ne strikte konforma al la difino de PV. (kun stelo * tiuj, kiuj troviĝas en PIV).

adolesk/i *

aglutin/iĝ/i : Vd PV, 1. analoge : dense kuniĝi (p. pri homoj)

ameboz/o *

a fortiori, latina esprimo : des (aŭ tiom) pli forte.

avi/o (elaviigi) = aviadilo.

cikl/o. En Francio, ĉiu instruada fako (elementa, dua-grada, teknika, supera) estas dividita je pluraj sinsekvaj jarcikloj.

cirkvit/o : cirkulejo (analoge senco, pli larĝa ol strikte elektra).

ĉart-aviadil/o *

demografi/o *

diskriminaci/o *

dizert/i, Vd PIV. analoge: forlasi sian postenon, sian normalan lokon.

duar/o * - etn/o * - gett/o *

impregn/i. Vd PIV, 4. Ĉi tie en figura senco.

infrastruktur/o : aro de la bazaj instalaĵoj, kiuj ebligas starigon kaj elvolviĝon de iu indusitrio.

kadr/o * : PIV, 4.

Kalabri/o * - Kanaan/o * PIV, 2.

kxenofob/o, -io * - Magreb/o *

margen/o PIV, 2 kaj 3.

mikro-soci/o : eta sociero.

paludism/o * = malario

planklum/oj * (PIV, ĉe lum/o). Ĉi tie en figura senco.

populaci/o : individuaro, en senco pli larĝa ol strikte statistika.

precept/o * - rakit/ism/o *

sektor/o * : PIV, 4 - unuagrada: agrikulturo; - duagrada : industrio; - triagrada : komerco, administrado, servoj.

serv/o *, PIV, 3. - skip/o *

tria-mondo : la aro de la malriĉaj nacioj, sen moderne ekipita industrio.

SAT-Broŝurservo : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut
***** poŝtkonto 3 374 04 M Bordeaux

Lanti: Adamaĵoj

Pannekoek: Antropogenezo

J.Duboin/P.V.Berthier: Abundo kaj konsumsocio

Malatesta: Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj

Diversaj aŭtoroj: Argentina Novelaro

Balkanski: La Bazoj de Anarkiismo

H.D.Thoreau: Civila Malobeemo

Pario: Durruti, simbolo de la hispana revolucio

Esperanto de poĉe

Esperanto en 24 paĝoj (por hisp., ital., portug.).

Kropotkin: Etiko I

J.London: La forto de la fortaj

Krishnamurti: Fronte al la Vivo. Rimarki

O.Wilde: La homa animo sub socialismo

Pannekoek: Historia materiismo. Socia organizo

Eugen Relgis: Humanitaristaj principoj

Han Riner: Individuismo en Antikveco

C.A.Laisant: La Parlamentisma Iluzio

Han Riner: Individuisma Manlibreto

B.G.D.: Jen la Dio !

Sébastien Faure: La Krimoj de Dio

Valo: Kontraŭflue

F.Baronnet: Lingvaj anguloj

Lanti: La laborista esperantismo

Diversaj aŭtoroj: La liberecana penso

Bastjan: La liberecana socio

Fontaura/Grave: Liberecanaj vivkonceptoj

Han Riner: Miguel Cervantes

P. de Cazenove: La migrantoj en Francio nuntempe

La Boétie: Memvola servuto

Bartelmes: Mia vivo. Artikolaro. Poemaro

Roza Luksemburg: Naciecaj problemoj

Rufegon: Manlibro de nova homo

T.Ebert: Ĉu neperforta revolucio aŭ liberiga milito?

E.Bellamy: Parabolo pri la cisterno

Paul Lafargue: La rajto de pigro

R.Laval: Pri la esperanta literaturo

Han Riner/Alain (tr.Lanti): Por nia medito

M.A.N.: Politika Neperforto

Diversaj aŭtoroj: Por la paco